

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Mars 1945

33 årg. Nr 3

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## Årsmötet 1945.


Svenska Esperantoförbundets årsmöte skall 1945 hållas i Stockholm, och som vanligt i pingsthelgen. Första mötesdag blir pingstaftonen den 19 maj.

Förbundsstyrelsen förbereder f. n. sina rapporter och förslag till mötet och kommer att kungöra en preliminär dagordning i nästa nummer av tidningen. Stockholms

Esperantoförening å sin sida överväger de glada omsorger, som följa med äran att vara mötets värd.

Klubbar och enskilda, som ämna framlägga motioner till årsmötet, erinras om nödvändigheten att ha insänt dessa till förbundsstyrelsen senast första dagarna av april. Detta bl. a. därför att manuskript till La Espero fr. o. m. mars i år tyvärr måste vara redaktionen tillhanda före den 16:e i månaden för att komma med i nästföljande månads nummer.

Reservera pingsten för årsmötet och Stockholm, som kommer att hälsa välkommen i sin vackraste vårskrud.



## Stellan Engholm respondas.

Se oni volus desegni la verkistan portretcn de Stellan Engholm, oni devus komenci per du parencaj trajtoj: seriozeco kaj konscienco, aŭ se vi tiel deziras, oni nomu ilin per alia vorto: sento de respondeco. Krom Engholm estas nur unu verkisto en la esperanto-literaturo, kiu same estimas la plumcn, per kiu li skribas, kiel Engholm: K. Kalocsay. Aliaj verkistoj havas kapricojn, tempon por nura ludo, por bagateloj, sed Engholm kaj Kalocsay sentas konstantan respondecon kaj neniam ili lasas sin subaĉetiĝi de sia — cetere — suverena arto. Kiomgrade Engholm sentas tiun ĉi respondecon, tion pruvas la fondo de la "Malgranda Revuo", tiu ĉi "torĉo en la mallumaj tempoj", kiel Söderberg karakterizis ĝin. Engholm sciis, kion li faras, li sentis ŝuldon al sia respondeca sento, sed estis tre malmultaj, kiuj povis sekvi lian penscn pri gazetfondo ĝuste tiam, kiam tio aspektis tiel nereala. (1943.) La verkisto kaj same la redaktoro estu utila volo, edukisto! Vi mem povus legi kelkajn ciferojn pri la Revuo kaj supozeble vi mem ligos viajn bonvolajn pensojn al tiuj ciferoj. Sed estas io tre grava, ke la volo de Stellan Engholm estas la natura volo de la esperantistaro kaj la esprimiĝo de tia volo devas vivi.

La graveco de Engholm neniam estis pli konkreta ol en tiu ĉi malfeliĉa tempo kaj oni sentas kordcloron pensante pri la nunaj eblecoj kaj pri la manko de la celkonscio en la homa vivo entute kaj en la detaloj. Se oni konstante konsiderus la gravecon de la homeduko ĝenerala la plej grava tasko de ĉiuj tempoj, oni povus redukti la eventualaĵojn de la eksplodoj.

Nenio estas pli malproksima de Engholm, ol la pozoj kaj senpozuloj ne ŝatas esti fotografataj kaj intervjuataj.

Sed ĉi-okaze ne temas pri artefarita pozo, rigidiĝo de la fotograf-objekto en flata pozicio, per kies arango ankaŭ la fotografanto volas briliĝi kapablon; estas nur simpla interparolo, aŭ pli ĝuste vortoj de Engholm, interesaj por ĉiu samcelano.

**Kiam kaj kiel vi komencis verki en esperanto?**

Tio okazis en la printempo 1929. Mi estis leginta diversajn librojn en esperanto kaj ankaŭ multajn gazetojn, kaj la lingvaj esprimmanieroj ne ĉiam kontentigis min. Mi diris al mi, ke devas esti eble esprimi la dirotajn aferojn tiel, ke la frazoj fariĝos belsonaj kaj bele konstruitaj, plenaj de vivo, vekantaj sentojn kaj imagojn, same kiel frazoj de bona nacilingva verkisto. Ĉetere "Faraono" kaj "Viktimoj" jam atestis al mi, ke estas eble skribi tiel. Nu, sed devas esti eble ankaŭ por mi skribi esperantan stilon, kiu sonas viva kaj natura por diverslandaj esperantistoj. Kun tiuj pensoj mi komencis skribi. Pri ceteraj literaturaj kvalitoj de la verketo — mi intencis skribi novelon ne longan — mi malmulte pensis, kaj tiel la enhavo fariĝis pli malpli hazarda afero. La komencaj paĝoj ne konvenis por fari mallongan novelon, sed mi daŭrigis, kaj tiel estiĝis *Al Torento*.

**Kion vi opinias pri esperanto kiel traduklingvo kaj originala literatura lingvo?**

Kompreneble mi opinias, ke esperanto taŭgas kiel literatura lingvo — alie mi ne estus daŭriginta verki originale kaj traduki en la lingvon. Ĝi estas bonega por ambaŭ taskoj. Sed opinioj ne multe valoras. Pli bone estas, se iuj el miaj pli bonaj verketoj aŭ tradukoj donas al legantoj la impreson, ke efektive estas tiel.

Al mi ŝajnas, ke esperanto havas ĉiujn kvalitojn, kiujn ni bezonas por traduki prozon kiel eble plej bone. Rilate al poezio ĝi havas malpli da eblecoj. Esperanto estas tro multsilaba por ĝenerale permesi altkvalitajn pcezitradukojn el malmultsilabaj lingvoj ekzemple la angla aŭ la nordaj. Krom tio la apostrofado de substantivoj ŝajnas al mi — kompreneble tio estas persona gusto — vera kripligo de la versoj, ekz. la traduko de Eŭgeno Onegin estas miraklo de laŭvorteco, sed pcezie ĝi estas monstro. Kaj tia kripligo estas plej ofte neevitebla en laŭmetra tradukado. Malgraŭ tio ekzistas ja bonaj verstradukoj. Sed ni ne diru, ke esperanto superas ekzemple la anglan aŭ la svedan en verstradukado. Tio estus mensogo. Esperanto ne povas facile redoni certajn versoformojn kaj precipe ne el malmultsilabaj lingvoj, tio estas fakto. Sed tiaj lingvoj troviĝas ankaŭ inter la naciaj, kaj malhelpoj troviĝas en ĉiu lingvo. Esperanto ne fariĝas senvalcra pro tiu manko. Ĉetere multe dependas de la tradukantoj. En esperanto ni havas multe, tro multe da diletanta tradukado. Diletanta kaj grupa tradukado estas bonega kiel ekzerco, sed ĝi nur escepte taŭgas kiel literatura produkto. Tradukisto devas esti sperta kaj lerta en la koncernataj lingvoj kaj ankaŭ sperta en verkado.

Fine mi volas diri pri tiu punkto, ke ni ankoraŭ tre malmulte utiligis la literaturkreajn eblecojn de esperanto. Kiam oni dum jaroj laboris pri esperanta stilo, oni komprenas almenaŭ tion, ke nia ĝisnuna literatura lingvo estas nur balbuta provo kompare al tio kio povos estiĝi. Rilate al versoformoj ni nenion kreis, nur imitis aliajn lingvojn. Kaj plejparte ni imitis versoformojn, kiuj ne konvenas por esperanto. Rimarku, kiel bone Zamenhof mem — ĉu konscie ĉu nur instinkte, tion mi ne scias — elektis versoformojn, kiuj konformas al diversaj kvalitoj de la lingvo. Apostrofado estas ĉe li escepto, kaj ankaŭ ĉetere estas bona harmonio inter la lingvo kaj la lingvouzo. Nek rimoj nek akcentitaj finsilaboj estas necesaj por krei altkvalitan poezion. Tion montris multaj aliaj lingvoj. La ritmaj eblecoj de esperanto estas tre grandaj kaj permesas versoformojn, kiuj estos ne malpli impresaj ol la imitoj de pli malpli modernaj versoformoj el nuntempaj lingvoj.

**Kia vi vidas la rolon de esperanto post la milito?**

Pri tiu afero mi preskaŭ tute ne pensis kaj neniel fantaziis pri ĝi. Certe estas pli bone kiel eble plej bone labori por konservi tion, kion ni antaŭe atingis. Certe ni trovos labortaskojn, se ni nur sukcesos kontentige

vivteni la movadon kaj la spiriton dum la milito, ĝis la fino. Sen tio lasta malmulte helpas belaj planoj.

**Diru ion pri la Malgranda Revuo!**

La celadon de MR mi difinis en la unua numero, ankaŭ en artikolo en *La Espero* kaj en cirkuleroj. Ĉetere ne estas necese ripeti tion. Ĉu mi sukcesis atingi, kion mi celis? Pri tio povas respondi plejparte la legantoj sed ne mi. La revuo ankoraŭ tute ne estas tia, kia mi volus havi ĝin. Ne estas eble en Esperantujo ricevi tiom da tiel altkvalitaj kaj diversspecaj artikoloj, kiom mi bezonus. Sed mi kredas, ke la programo tamen ne estas fuŝita. Se la aperintaj numeroj ne estas perfektaj, ili espereble tamen estas tiom bonaj, ke la celado kaj la spirito de la afero estas percepteblaj. Ĉu la revuo sukcesis doni al iu tiun bonan legaĵon, tiujn instigojn kaj impulsojn, pri kiuj mi parolis en la programo, ĉu ĝi aktive efikis al legantoj — tion mi fakte ne scias. Diversaj legantoj el diversaj landoj skribis, ke ili estas tre kontentaj pri ĝi. Sed eble la vendociferoj donas la opinion de aliaj legantoj.

Ne havas sencon nun paroli pri la evoluigo de la revuo. Ĝis hodiaŭ, la 28 a de januaro 1945, estas venditaj de nro 3/44, kiu aperis en aŭgusto, sume 200 ekzempleroj, de nro 4, kiu aperis en la komenco de decembro, 150. Mi eldonis ĝin sole per tio, kion mi povis ŝpari de mia salajro, sed tiu ŝparo ne sufiĉas por kovri la diferencon inter elspezo kaj enspezo, se ĝi restos tiel granda. Ĉetere la plej bona revuo en la mondo estus ja sensenca afero, se ĝi ne havus certan minimuman nombron da legantoj.

**Ĉu vi volus diri ion pri viaj planoj kaj celoj literaturaj?**

Mi tute ne havas planojn, ĉar ne havas sencon fari tiajn. Kaj sen planoj ankaŭ ne havas sencon paroli pri celado. Vidu, la tria parto de *Infanoj en Torento* kuŝas presopreta de 1941. Kontraŭe al la dua parto oni povas tre bone legi ĝin sen scio pri la antaŭa rakonto, kaj ĝi havas pli da ĝenerala intereso, ĉar la rakonto parte transformiĝas en socian analizon. Sed neniu povas eldoni ĉar la enspezoj verŝajne ne kovrus pli ol kvinonon de la elspezoj por aperigi ĝin. Same estas pri miaj malnovaj libroj. La unua parto de *Infanoj en Torento* — kiu estas la plej bona el miaj aperintaj libroj kaj sen kiu la dua parto ne estas komprenebla — ne estas havebla de ses aŭ sep jaroj. La pli multaj nuntempaj svedaj esperantistoj verŝajne eĉ ne scias, ke ĝi ekzistas. Kaj same estas pri *Homoj sur la tero*.

Verdire mi havas tre multe da pensoj kaj sentoj, kiujn mi ŝatus esprimi per verkado. Sed la profesia laboro donas malmulte da necesa trankvilo por efektiva verkado, kaj la scio, ke neniu eldonisto povus eldoni eventualan verketon, donas tre malmulte da instigo.

Aldono de la demandinto: Ankaŭ el pesimismaj konstatoj povas kaj devas naskiĝi optimisma volo.

F. S.

*Hasse L:s*

Humoresker på Esperanto.

Översatta av Dr F. Szilágyi.

"Hans konst kan visserligen vara burleskt grotesk och hans blick på medmänniskan infernaliskt skarp, men hans förmåga att se det komiska i de minsta bagateller är beundransvärd. Han är en de bizarra effekternas mästare och han ser på sitt offer med djup, psykologisk blick och med filosofens förståelse. Man förnimmar bakom ordet mera det förlåtande löjet än det gisslande riset." — — —

EN NÖJSAM BOK  
OCH EN GOD BOK.

Pris 2.25 (inkl. oms. o. porto) vid förskottslikvid  
,, 2.50 (inkl. oms. o. porto) vid postförskott.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 19071

Stockholm 19

Postgiro 578

## Patrino, naskhelpanto kaj morthelpanto.

Virina alvoko al virinoj.

Patrino — tio estas kreantino kaj gardantino de la vivo. Esti patrino estas io bela kaj pozitiva por ĉiu sana virino. Inverse por la viro estas la plej bela titolo esti naskhelpanto, esti favoranto de ĉio vivanta.

Forte mi sentas kiom necesegas fari tion kio neniam estis farita — hodiaŭ kaj ĉiam ree denove, morgaŭ kaj ĉiutage — nome tute pleniĝi kaj esti penetrata de ĉiuj ambaŭ ideoj; patrino kaj naskhelpanto. En ĉiuj ideoj kulminas la homeco. En ili esprimiĝas la eblecoj de plej alta maturo kaj plej pura feliĉo por viro kaj virino. Kaj ion pli: ilia plej bela kunlaboro kaj kompletigo.

Ni enmergiĝu tute en la signifon: patrino, donacanta la vivon tra la doloro, venko de la produktivo super la sufero. Kaj apud la patrino jen la viro kiu venas renkonte al la vivdeziro de la naskota estaĵo, la naskhelpanto. Nuntempe oni nomas lin ĝinekologo — kuracisto klerigita kaj edukita per ĉiuj artifikajoj por helpi la virinon naski homidojn.

Krom tiuj devus troviĝi ankaŭ la spirita naskhelpanto kaj la spirita kreantino del surtera estado, kiuj ambaŭ por sia misio bezonas antaŭ ĉio kunsentivon, komprenon kaj paciencon.

\*

Morthelpantoj — tio estas la multaj anime malfortaj, degeneritaj homoj, la multaj anime dormetantaj patriroj, la multaj milionoj de needukitaj kaj misklerigitaj viroj kiuj — anstataŭ gardi la vivantan — sisteme laboras por sia propra baldaŭ kaj terura morto kaj por la morto de siaj kunhomoj. Morthelpantoj estas viroj kiuj de jarmiloj semas militon kaj mizeron — kaj virinoj kiuj ilin subtenas en tio.

La milita menso estas kulturata de ĉiuj morthelpantoj kaj plej bone ĝi estas akcelata per la imitemo. Ĉiuj instinkto estas firmege fiksita en nia animo kaj povas efiki benporte. Imitante la infano lernas paroli. Survoje al la enordigo en la homan socion — kiel en ĉiuj kazoj: en la lingvan socion — la inklino imitadi estas necesa apogo. Kaj nun ni evoluigu la penson, paŝon post paŝo, sentime kaj konsekvence.

Jam kiel etaj infanoj ni imitas do paroli kaj agadi kiel oni parolas kaj agadas ĉirkaŭ ni. Kaj kion ni kreskuloj instruas al la infano? Kiujn imitindajn ekzemplojn ni donas al ĝi? Infanoj aŭdas kaj legas. Milionojn da sonoj ili aŭdas kaj milionojn da literoj ili legas. Ĉio kune rezultas en jenaj diroj: "Ni kontraŭbatalos tiujn landojn ĝis ilia ekstermo. Ni forpelos vin, ĉar vi baras nian vojon. Ni verŝos vian sangon, ĉar vi estas nia malamiko kaj sangverŝis batante nin. Ni detruos tion ĉar ni ne volas ke ili ĝin ricevu. Ni forbruligos por ke ne ni mem estu forbruligataj . . .".

Tiel pensas, tiel diras, tiel skribas viroj ekde jarmiloj. Kaj niaj unuaj infanrigardoj kaptas tion en sian akceptopretan junan animon.

Kelkaj konkretaj ekzemploj pri kion tiaj eldiroj efikigas — de la jaro 1943. Sveda knabo 11-jara diras al sia patrino: "Tion mi volonte faros, ĉar tiam mi devas pensi pri sangobano kaj tio estas interesa!" Alia knabo samaga vokas al sia patrino: "Nun tuj mi ne povas veni por manĝi, unue mi devas iom militi ankoraŭ, aliel revigliĝos la malamiko!"

Ni direktas do la pensojn de niaj posteuloj al la infero. Tamen niaj pensoj estas la kondukantoj de nia agado. Ili kondukas nin aŭ al la infero aŭ al la ĉielo. Tio fine devas iĝi evidenta por ni. Laŭ la naturo de la penso sekvas la faro aŭtomate, en senco benporta aŭ anatema.

En la nuna tempo, kies manifesto estas retrovi la vojon al Dio kiu nin forlasis, serĉi Lin libervole tra ĉiuj teruroj de tiu materio, kiun ni kreis sed kiun ni ankoraŭ ne lernis majstri spirite — en la nuna tempo necesas antaŭ ĉio: fari nian internan mondon klarvida! La mondo en ni devas ekkoni ke ni aŭtomate kulturis la sendiecon, kiu samtempe estas la plej terura aflikto, se ni, kvazaŭ ne plenaĝaj infanoj, ne pripensante persistas en la imitado. La plenkreskulo devas spirite provi ĉion kaj kontroli. Li devas submeti sian pensadon je konstanta kaj severa ekzameno.

Ankoraŭfoje nin tute penetru la ekkompreno: penso

## Veiko Johannes.

(Daŭrigo)

Rakonto de Einar Wallquist. Trad. H. J. Dahlén.

Estis miksa aro da homoj, kiu ĉeestis en la intermonta domo tiun ĉi printempan vesperon en la jaro de kolero 1940. Tion kiom permesis la lingvaj malfacilaĵoj, mi provis informi pri la sanstato inter la fremduloj, kiuj sidis silente atendente aŭ nur indiferentaj. Nur ripozon kaj dormon ili nun deziris. Kelkaj palaj patrinoj senvolaj rigardis antaŭ sin, dum iliaj infanoj alkroĉis al ili. La infanoj estis grandaj. Tie estis duon-kreskintaj knabinoj, kiuj devis kunhelpe porti aŭ treni la plej etajn. Kaj tie estis malgrandaj viroj estontaj, kiuj ne multe atingis super la tablorandon, sed tamen paŝadis la longan vojon en la neĝa malsekaĵo. Kaj tie estis etuloj, tute dependaj de la grandaj, kaj suĉinfanoj, kiuj konstante kuŝis sur la patrina brako.

Veiko Johannes evidente dormis en la boato kaj nun estis malbonhumora. Ĉar oni vekis lin. Kelkan tempon li ĉirkaŭpaŝetis sur la planko kun la ruĝa hararo en grandega malordo kaj muksorbis per sia malpura platnazo, malkontenta pri ĉio kaj ĉiuj. Pro ploro li baldaŭ laciĝis kaj suprenrampis sur la genuojn de la patrino, kie li kontente ekdormis kun la kapo peze falinta malantaŭen, brakoj kaj piedoj malstreĉe ĉiu en sian direkton.

En angulo sidis maljuna virino, kiu dum la malfacilaj decembrotagoj devis kun sia maljuna edzo forlasi la dometon, kiun ili posedis. Ĝis antaŭ nelonge ŝi kune kun li travivis la afliktojn de la vojaĝo. En la enloĝejo transflanke de la montaro ŝi donis al li la lastan flegadon antaŭ ol li por ĉiam disiĝis de ŝi. En ŝia sinteno estis io nerva kaj kortuŝe mallerta. Ŝi tute perdis spacon, tempon kaj signifon de sia vivo.

En la akompano estis kelkaj junaj knabinoj. Tia vago certe al ili estis malgaja kaj malproksima de tio, pri kio ilin scigis filmo kaj koloritaj jurnaloj.

Kelkaj virinaj savarmeanoj estis la solaj, kiuj restis je bona humoro. Ilia kreda certeco ŝajne estis de vera kvalito. Ili estis ĝoje esperantaj en ĉiuj mizeroj kaj montris bonan homamon en amika maniero admonante junan edzinon, kiu subite ekploris pro sia mizero. Ilia decida kuraĝigo helpis al la malĝoja virino reakiri necesan memregadon.

Nur unu viro, serioza finno de rekta sinteno, ĉeestis la akompanon. Komence de la milito li estis vokata en la armeon. Postlasinte la gravidan edzinon en ilia novkonstruita hejmo, li batalis dum monatoj en frosto kaj mallumo por fine ĝisvivi la pacon kun ties strangaj animstatoj. Kiam li revenis hejmen, li trovis ke la domo estas bruligita kaj la edzino malaperinta. Li sekvis la postsignojn, kiujn li povis trovi, serĉis ŝin ĉe la fjordoj kaj fine sciigis ke ŝi troviĝas en la hospitalo de Bodö. Ŝi estis flegata pro kormalsano, trafinta ŝin per la nasko de la infano. Ŝi mortis tuj post kiam li trovis ŝin.

Nun li venis kun la infano. Li sukcesis aĉeti malnovan uzitan infanveturilon en Norvegujo, alligis skiojn sub ĝin. Kaj en ĝi li kuntrenis sian unuenaskitan filon trans la montegaron kaj suben tra la betularbaro kaj trans la glacieron de la lagoj. Vojon por la etulo li faris tra arbustajo kaj salikejoj tiel ke krakis en la arbustoj. La filo devas hejmen al Finnlando.

Neniu el la virinoj havis en siaj sekiĝintaj mamoj ion por doni al la suĉinfano. Nek lakton nek ion alian por li konvenan nutraĵon oni pro la urĝo sukcesis kunporti kiam oni fuĝis. Sed unu el la edzinoj kunportis en sia tasko saketon da tritikogrio. Ĝin oni malsekigis en akvo kaj donis al la knabo. Spite de montegvojaĝo kaj nutrajmalfacilaĵoj la infano jen kuŝis biletante sur la genuoj de la dommastrino antaŭ la melfermita fajruja klapo, dum la nepriskribeble malpurigitaj vindotukoj estis ŝanĝataj je puraj vestaĵoj. La viro alrigardis kun malĝojaj okuloj sed ridetanta buŝo. (Daŭrigo)

sekvigas faron. Do se ni pensas kiel patrino aŭ naskhelpanto, nia faro en benporta aŭtomatismo konfesos la vivon, malrapide nur kaj pciome — anstataŭ konfesi ties plej malhonoran, insultan kaj stultan neigon — kaj ni ricevos tiujn gvidantinojn, kaj kondukantojn, tiujn kunagantinojn kaj kunlaborantojn, kiujn ni bezonas ĉe la necesa riparado kaj rekonstruado anima kaj materia de la mondo.

L. Hainisch.

**BRASILIENS GEOGRAFIKER-KONGRESS  
OCH ESPERANTO.**

Brasiliens 10:e geografikerkongress, som 7—16 sept. 1944 var samlad i Rio de Janeiro, gjorde följande uttalande:

Med hänsyn till de stora fördelar, som användningen av ett internationellt språk medför för vetenskapen;

med hänsyn till att Brasiliens geografiska och statistiska institut antagit esperanto som sitt hjälpspråk;

med hänsyn till de utmärkta resultat som uppnåtts genom de initiativ, som tagits av "Geografiska sällskapet i Rio de Janeiro" tidningsorgan och av "Brasiliens geografiska revy", nämligen genom att införa resuméer på esperanto av dess artiklar och genom att publicera på detta språk resuméer av Brasiliens statistiska årsbok och av broschyren "Staden Salvador";

och med hänsyn till att — på initiativ av Brasiliens geografiska och statistiska institut och med stöd av statens tidnings- och propaganda-departement — den berömde amerikanske professorn Benjamin Runnicutts verk "Brazil looks forward" översatts till och utkommer på esperanto;

uttalar sig kongressen, i likhet med dess föregående kongresser — för lämpligheten av att det internationella hjälpspråket esperanto kommer till användning för spridandet av geografernas arbeten.

**ESPERANTO I BRASILIEN.**

I april äger den 10:e Brasilianska esperanto-kongressen rum med Brasiliens president dr Vargas som beskyddare. Ordförande i organisationskommittén är f. d. utrikesministern ambassadör Soares. I kongressens hederskommitté sitta dessutom bl. a. ärkebiskopen, fem ministrar och generaldirektören för statsbanken.

Brasiliens geografiska och statistiska institut, som åtagit sig att bekosta kongressstucken, kommer i samband med kongressen att utge en större bok om Brasilien på esperanto samt att trycka en karta över Brasilien, likaledes på esperanto.

Ministern för statens arbeten har beslutat utgivandet av frimärke med esperanto-text i samband med kongressen, och generaldirektören för post och telegraf har tillåtit användningen under kongressen av en särskild stämpel.

Till kongressen har redan anmält sig ett stort antal personer och dessutom många kulturella, kommersiella och religiösa sällskap.

**TAG EXAMEN DEN 18 MARS!  
ANMÄL DELTAGANDE HOS INSTITUTET.**

**EL FINNLANDO.**

**INTERNACIA BONTEEMPLANA ORDENO KAJ  
ESPERANTO.**

Finna bontemplano-esperantisto korespondis kun la internacia ĉeflogiestro (international chief templar), senatano Oscar Olsson, pri la signifo de nia lingvo kaj ricevis jenan afablan respondon: "Jes, mi estas egale interesita pri la internacia mondlingvo kiel fr. Wavrinsky estis. Tial mi tute ne havas ion kontraŭ tio, ke la esperantistoj faru iniciaton en la demando tuj kiam nia internacia organo denove povos ekaperi. Tie ni havis ofte kolonon en Esperanto. Sed la plej proksiman jaron post la fino de la milito ni devos, jes, tute dediĉi al la organiza rekonstruad-laboro de nia frataro. Via propono pri la bontemplana programo en nia radio en Esperanto ne estas efektivebla. Kontraŭ tio vi devas ja alvoki bontemplanojn el Svedujo alveturi al la tendaro en Punkaharju, tuj kiam ĝi estas definitive decidita. Mi kredas sufiĉe, ke tie ĉi ekzistas esperantistoj, kiuj volonte transveturos."

La esperanta kurso por komencantoj, prelegoj kaj ekskursoj al la ĉarma ĉirkauajo de Punkaharju en la orienta Finnlando estos okazigata la 8—14 de venonta julio. Svedaj bontemplanoj estas do tutkore bonvenaj tien! Oni sin anoncu al ties organizanto sro Kaarlo Jokinen, sub adreso Töölöntullikatu 7. A. 2., Helsinki. Partopreno kostos 600 mk por unu semajno. El Svedujo verŝajne veturos unu aŭ pluraj prelegontoj.

**ESPERANTO KAJ LA INTERNACIA ABSTINENCA  
MOVADO.**

Finna bontemplano, kiu uzadas pseŭdonimon "Bontemplano", eldonis finnlingvan flugfolieton, nomatan, "La mondmisio de kontraŭalkoholismo kaj Esperanto", kie li akcentas la urĝecon kiel eble plej rapide enkonduki nian lingvon en la internacian batalon kontraŭ la tutmonda malamiko de la homaro—alkoholo. Per nia lingvo oni plej facile povas propagandi la abstinecan ideon, korespondi per ĝi, aranĝi internaciajn kongresojn, agrablajn letervesperojn kaj travojaĝi la tutan mondon. La abstineco ja ofte estis en la programo de niaj internaciaj kongresoj, kaj en Varsovio je la jaro 1937 oni eĉ starigis oficejon por propagando de antialkoholismo en la mondo.

H. S.

**La internacia turista asocio "La naturamikoj" kaj Esperanto.**

Same kiel nia kara Esperanto movado, same ankaŭ la turista asocio "La Naturamikoj" multe suferis sub la batoj de la milito. Sed nun venos baldaŭ nova tago. Ĉie regas nova vivo kaj entuziasmo por la bonaj, pacaj kaj kulturaj celoj. La esperantistoj kolektiĝas sub la verda standardo, kaj la naturamikoj kiuj memoras en tiu nova jaro la 40-jaran datrevenon de la fondo de la unua svislanda turista grupo, preparas sin rekonstrui la naturamikan internacian movadon. La svislanda sekcio nombras nun ĉirkaŭ 12.000 membrojn.

Antaŭ 50 jaroj en Vieno kuniĝis 37 kamaradoj kun la celo, veki ĉe la laboristaro de la fabrikoj kaj kontoroj en la grandurbo la ĝojon je la naturo kaj la spiriton de vere amika komuneco. Baldaŭ la bela afero disvastiĝis en Aŭstrio kaj ne haltis ĉe la landlimo.

Antaŭ la milito ĝi kreskis al grava internacia organizo, al kiu apartenis 11 landaj sekcioj, kiuj jam posedis centojn da naturamikaj hejmoj situataj, ĉu en bela, rava kampara ĉirkaŭajo, ĉu en alta montaro sur alpoj proksime de rokoj kaj eterna neĝo. Parte ili estis konstruitaj en komuna laboro dum libertempo kaj parte estis aĉetitaj celutilaj domoj el la ŝparitaj kotizetoj. La hejmoj servos kiel kunveno de la genaturamikoj dum libertempo, por pasigi ferion en la bela naturo kaj precipe kiel elirloko por belaj promenadoj en la florumitaj kamparoj aŭ por montgrimpado. Sed ankaŭ de la migrema amikaro ili estis tre ŝatataj. Tie ili trovis lokon por ripozo, ĝojan seriozan, amikan rondon kaj bonvenigan gastamon.

Rakontoj pri vojaĝoj kaj fremdaj, frataj popoloj ĉiam estis ŝatataj temoj same kiel la natursciencaj klarigoj kaj paroladoj, kiuj kutime estis flegitaj por akiri pli seriozan konon de la naturo kaj krei profundan amon al ĝi. Sed ankaŭ kun ĝojo estis konstatebla ke ankaŭ ESPERANTO, la lingvo internacia, tiris la intereson de la vojaĝema anaro al si. Kelkaj faktoj pruvas tion: Belga naturamiko iam raportis: "Kurso por Esperanto akiris multan intereson"; En Svislando oni nomigis naturamikan hejmon situatan en la valo Willard "Fratego"; En la jugoslava gazeto "Suda Stelo" aperis longa artikolo pri la tiea laborista turista movado kaj laŭ informo de hungara kamarado la Esperantistoj kaj Naturamikoj bone kunlaboris en sia lando. — Kaj nun post tiu longa interrompo, kaŭzita de la mizeriga interhoma batalo, ni je la komenco de la nova jaro 1945 reprenu la laboron kaj daŭrigu la fidelan, pioniran agadon de la geamikoj por la popol-interliga lingvo Esperanto en nia kara naturamika movado ĝis la venko de la frata kaj justa spirito kiu certigos la mondpacon.

Karaj geamikoj, la unua tasko nun estas propagandi per interesaj artikoloj el la Esperanto-movado en la naturamikaj gazetoj. Jam aperis en la decembra numero "Berg frei" artikoleto kaj nun ĵus alvenas la januara, bele ilustrita revueto "Der Naturfreund" kun alvoko en ĝi por ESPERANTO, Ni daŭrigu!!! Montru al la Centra Komitato de la turista movado internacia kiu havas la sidejon en Zürich ke Esperanto vivas, per multaj salutleteroj el la tuta mondo okaze de la duobla datreveno de la naturamika movado.

Por certigi bonan sukceson la amikoj estas petataj represi kaj traduki la artikolon kaj sendi la leterojn kaj gazetojn destinitaj al la naturamika centra komitato al

**GARANT!**

Du skall hjälpa förbundet att få en ekonomisk ryggrad för sin verksamhet. De vanliga medlemsavgifterna räcker inte. Förbundet har något över 1.000 medlemmar, och får, bortsett från tidningen, av vardera 2 kronor, av vilka dock 50 öre går till IEL. Enbart förbundsskolan tar årligen över 1.000 kronor, och det skulle då återstå kanske endast 500 kronor för all verksamhet. Det är klart att detta inte räcker till stort mer än nödvändiga trycksaker, porto o. s. v. Förbundet har alltid behövt pengar skaffade på annat sätt, men det är nog inte utan att det blir lite tröttsamt med den ena insamlingen efter den andra.

Meningen med den nya garantinstitutionen är att göra dessa olika insamlingar överflödiga. Den som har råd blir **g a r a n t** och betalar **1 0 k r o n o r o m å r e t** utöver den vanliga årsavgiften. Man skulle tycka att 10 kronor inte är för mycket när det gäller en hjärtesak. Vi hoppas också att få minst 100 garantier. Därigenom skulle förbundets ekonomi tryggas, och dess ledare kunde, fria från alltför svåra ekonomiska bekymmer, lyfta tankarna till ett fruktbarande utvecklingsarbete för esperantorörelsen.

